



“FAJRO KAJ AKVO, KIEL ARMILOJ”

“Por la turka registaro la kurdoj ne estas homoj, ni ne havas iun ajn rajton, kiujn ajn metodojn ĝi utiligas kontraŭ nia popolo por atingi sian celon: nin forĵeti el nia lando”, diris Alan, loĝanto de Amedo⁽¹⁾. Tion li asertis pro la bruladoj okazintaj en la provinco de Amedo. De antaŭ jaroj la turka registaro avidas okupi la kurdajn terojn. Alan diris, ke la celo estas elĵeti iom post iom la posedantojn el ties parceloj kaj ilin anstataŭi per fideluloj de la reĝimo. Por tion atingi oni ofte utiligas la bruligon. Kiel konsekvenco, la tieaj loĝantoj devas foriri, kaj la parceloj restas je posedo de la registaro, kiu ilin transdonas al alitipaj personoj aŭ utiligas por aliaj projektoj. La turka registaro ne agas tiel nur en sia submetita parto de Kurdio; transe de la landlimo ĝi utiligas la saman taktikon kontraŭ la kurdoj, en Sirio kaj Irako.

Tiun artifikon oni suferis en Heskifo⁽²⁾, urbo de la provinco de Batmano⁽³⁾ en Norda Kurdio⁽⁴⁾. Antaŭ kelkaj jaroj oni volis ekkonstrui digon, kio subakvigis 68 vilaĝojn. Tiu projekto celas translokigi 68 000 personojn. Krom tio, ĝi fordetrus grandan parton de la kurda kultura trezoro. “Bedaŭrindas. Ili alvenas, kaj senaverte ili diras, ke ni devas forlasi nian domon de unu tago al alia”, rakontis virino nomata Amire.

En la provinco de Amedo oni spertis similajn situaciojn en multaj lokoj. Tie, oni rekte forĵetas domojn. “Oni eniris en la kvartalon kun maŝinaro kaj diris, ke ni devas foriri. Mi demandis al ili la kialon, kaj la policistoj diris, ke oni devas faligi multajn domojn de la kvartalo”, klarigis Nazim, loĝanto de Farkino⁽⁵⁾. La loĝantoj de la provinco de Amedo, kiuj plej suferis pro tiuj okazintaĵoj estis tiuj de la sudo; tiuj de Ĝiziro⁽⁶⁾, Farkino, Gevero⁽⁷⁾ kaj Hezeĥo⁽⁸⁾. “Per ĉiu ĉi detruado, la registaro volas atingi demografian ŝanĝon; ĝi kredas, ke tiel ĝi sukcesos. Sed ne, vidi tiajn aferojn plifortigas nin”, diris Ramazan, loĝanto de Amedo.

Tiuj homoj ege suferis, sed ankoraŭ havas forton por rezisti. “Nia intenco estas resti en niaj regionoj. Ili ne povas nin elĵeti de unu tago al alia. Ili scias, ke ni revenos, kaj ili ne povos nin elĵeti el niaj domoj.” Jen la paroloj de Yahya. La etoso en Amedo tre varmas pro tiu ĉi afero, eĉ se la PJD⁽⁹⁾ de la prezidento Erdogan fortas post la balotado^(*). “Ili klopodas nin timigi, sed ne sukcesos”, fiere asertis Yahya.

“Uniforma ŝtato”

El la PDP⁽¹⁰⁾, partio favora al la memdeterminado de Kurdio, oni deklaris al *Berria*, ke la situacio estas neeltenebla. “Erdogan deziras disvolvi uniformigitan ŝtaton, kaj ĉion, kio malsamas, li frakasas.” Je la nuna politika situacio en Turkio la PDP opinias, ke malmulton oni povas fari el la opozicio. “Ĉion ajn rilatantan kun la kurda kulturo Erdogan klopodas forviŝi, kaj post venki en la baloto la situacio estas pli malbona. Ion oni devas fari, sed ni ne scias kiel.”

Por kurdoj klaras, ke oni ne elĵetos ilin el siaj teritorioj, kaj por la registaro de Ankaro klaras, ke ĝi volas posedi tiujn terojn. Nazim, loĝanto de Farkino, resumis la zorgojn de multaj kurdoj: “Erdonan diris, ke la problemo de la kurdoj estas lia problemo. Verŝajne li mensogis. Nun li havas la tutan povon, kaj ni ne scias, kio okazos”.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

(1) Amed (Diyarbakir en la turka).

(2) Heskîf (Hasankeyf en la turka).

(3) Batman.

(4) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.

(5) Farqîn (Silvan en la turka).

(6) Cizîr (Cizre en la turka).

(7) Gever (Yüksekova en la turka).

(8) Hezex (Idil en la turka).

(9) Partio de la Justeco kaj la Disvolviĝo (PJD)/Adalet ve Kalkinma Partisi (AKP), en la turka.

(10) Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Txabbarri.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 9-an de Septembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Novembro 2018-a. Provlegis: DS.

